

En la hodiaŭa, interkonektita mondo la kapablo paroli multajn lingvojn kaj komuniki tra la lingvaj baroj estas grava lerto por ĉiuj. Eĉ parta kono de pli ol unu lingvo estas avantaĝa. Kapablo paroli aldonajn lingvojn estas nova speco de tutmonda alfabeteco. Lingvolernado bezonas esti vastigata por ĉiuj, junuloj kaj maljunuloj.

Ĉiuokaze al milionoj da homoj tra la mondo oni neas la naturan rajton pluteni, ĝui kaj evoluigi siajn lingvojn de identeco kaj komunumo. Oni devas korekti ĉi tiun maljustaĵon per lingvaj politikoj, kiuj subtenas multlingvajn sociojn kaj individuojn.

Ni, la partoprenantoj en la sesio de la *Salcburga Tutmonda Seminario pri Saltotabulo al Talento: Lingvolernado kaj integriĝo en Tutmondigita Mondo* (Decembro 12-17, 2017 salzburgglobal.org/go/586), alvokas por politikoj, kiuj valorigas kaj subtenas multlingvecon kaj lingvajn rajtojn.

La Salcburga Deklaro por Multlingva Mondo estos subtenata de kompleta raporto kaj blog-artikoloj pri la ĉefa temoj, aperigitaj dum 2018.

La Salcburga Deklaro por Multlingva Mondo

NI VIVAS EN MONDO, EN KIU:

- Ĉiuj 193 membro-ŝtatoj de UN kaj multaj homoj estas multlingvaj
- 7,097 lingvoj estas nuntempe parolataj tra la mondo*
- 2,464 el ili estas endanĝerigitaj
- 23 lingvoj superregas, ili estas parolataj de pli ol duono de la monda loĝantaro
- 40% el la homoj ne havas aliron al edukado en lingvo, kiun ili komprenas
- 617 milionoj da infanoj kaj geknaboj ne atingas minimuman kapablonivelejn pri legado
- 244 milionoj da homoj estas internaciaj migrantoj, el kiuj 20 milionoj estas rifuĝintoj, kun pliiĝo de 41% ekde 2000. Migrantoj kaj rifuĝintoj solaj konsistigus la 5-an plej multenombrian landon en la mondo.

Nia mondo estas vere multlingva, tamen multaj edukaj kaj ekonomiaj sistemoj, civitanecaj proceduroj kaj publikaj administradoj malavantaĝigas milionojn da homoj pro iliaj lingvoj kaj lingvaj kapabloj. Ni devas solvi ĉi tiun defion, se ni devas atingi la Daŭropovan Evoluigajn Celojn alprenitaj en 2015 fare de 193 landoj por “forigi malriĉecon, protekti la planedon kaj certigi prosperon por ĉiuj”. Justa eduka sistemo konstruita sur fortaj kaj justaj lingvo-politikoj estas esenca por inkluziva progreso.

PRINCIPOJ

- Multlingveco indikas la uzon de multaj lingvoj en socio aŭ grupo. Ekzistas pluraj specoj de multlingveco; difinoj povas esti aplikataj al individuoj, komunumoj, ŝtataj kaj internaciaj organizaĵoj.
- Plurlingveco indikas la ĉeeston de multaj lingvoj en la persona posedo de individuo.
- Historiaj, geografiaj kaj sociaj-ekonomiaj kondiĉoj portas al multaj malsamaj formoj kaj uzoj de multlingveco.
- Multlingva edkado kaj subteno por socia multlingveco fare de ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj antaŭenigas interŝanĝon de scioj kaj interkulturan interkompreniĝo kaj fortigas internaciajn rilatojn.

Celhavaj lingvo-politikoj povas kuraĝigi socian kunapartenon, plibonigi edukajn rezultojn kaj antŭenpuŝi ekonomian evoluon. Aliroj laŭ aldonata lingvo-lernado helpas komunumojn pluteni siajn identecajn lingvojn, kiuj portas iliajn konojn kaj kredojn, dum ili kreas eblecojn lerni novajn lingvojn por persona, senstreĉiga kultura aŭ ekonomia avantaĝo. Multlingvaj politikoj povas subteni la ununurajn kaj vivajn rimedojn de lingvo-diverseco kaj gvidi pozitivajn ŝanĝojn en la mondo ekonomie, socie kaj politike.

Ni urĝas individuojn, kompaniojn, instancojn kaj registarojn alpreni multlingvan pensomanieron, kiu festas kaj antŭenpuŝas lingvan diversecon kiel la tutmondan normon, solvas lingvan diskriminacion kaj evoluigas lingvo-politikojn, kiuj favoras multlingvecon.

REKOMENDOJ

Farado de politikoj

Sukcesa politiko-farado bezonas informojn de fakuloj kaj aktivan partoprenon de interesohavantoj en la komunumo. Farado de raciaj kaj klaraj programoj pri lingvoj en la socio signifas:

- negoci klarajn celojn, kiuj etas realecaj kaj atingeblaj
- enpreni ĉiujn interesohavantojn en la politikan procedon kun elstara rolo por instruistoj je ĉiu nivelo
- enfokusigi ĉiujn lingvo-bezonojn, inkluzive de plutenado, lernado kaj uzado de malplimultaj lingvoj
- liveri taŭgajn rimedojn por plena decido-efektivigo
- utiligi la eblecojn de komunikada teknologio
- daŭrigi la politikon de la antŭlerneja al la postlerneja kaj neformala kaj tutviva edukado
- kontroli kaj taksi la politikajn celojn kaj efektivigon regule

Instruado kaj lernado

La plena celo de lingvo-politiko estas socia, ekonomia kaj kultura kiel antaŭ eduka. Tutviva lernado de lingvoj estas esenca por socioj cele al subteno kaj ricevado de avantaĝoj el multlingveco. Politiko de lingvo-edukado devus antaŭenporti lingvo-lernadon por ĉiuj samtempe kun pozitiva takso de lingvo-diverseco. Infanoj kaj plenkreskuloj devus havi la eblon aliri tutvivajn integritajn kaj daŭrajn oportunojn por evoluigi, riĉigi kaj vastigi siajn lingvo-kapablojn.

Nova edukada modelo estas bezonata, kiu inkluzivu tradiciajn kaj alternativajn sistemojn de scioj samtempe kun moderna teknologio. Retaj paĝaroj por aktiva lingvo-lernado faras multe pli ol lernejoj kaj instancoj de supera edukado. Stratoj, hejmoj, sociaj retoj, komputilaj medioj kaj sistemoj de helpo al rifuĝintoj, ĉiuj povas subteni lernadon kaj ŝatadon de lingvoj.

Tradukado kaj interpretado

Ĉi tiuj servoj estas integra parto de la projektado kaj liverado de publikaj servoj kaj de inform-interŝanĝo en multlingvaj socioj. Justa partopreno en san-servoj, edukado, ekonomiaj kaj leĝaj medioj baziĝas je libere havebla kaj profesia lingvo-helpo.

ALVOKO AL KUNAGADO

Interesiĝantoj, kiuj povas gvidi ŝanĝon, inkluzivas esploristojn kaj instruistojn, komunumajn laborantojn kaj kulturajn agantojn, organizaĵojn kaj instancojn de la civitana socio kaj neregistarajn, decidofarantojn, publikajn oficistojn kaj politikistojn, negocajn kaj komercajn interesohavantojn, helpajn kaj evoluigajn agentejojn, fondaĵojn kaj bonfarajn organizaĵojn. **Ni alvokas al ĉiuj ili helpi:**

- evoluigi lingvo-politikojn, praktikojn kaj teknologiojn, kiuj subtenu stabilajn, koherajn, dinamismajn sociojn kun pozitiva sinteno al multlingveco kaj plurlingveco
- aktive subteni lingvajn rajtojn, diversecon kaj civitanecon en oficialaj dokumentoj kaj en publikaj mesaĝoj
- zorgi pri ĉiuj okazoj de diskriminacio, antaŭjuĝo, malfavoro kaj malegaleco kunligitaj kun lingvo kaj kapablo legi kaj skribi.
- rekoni ke malplimulto, migrantoj kaj rifuĝintoj posedas grandan lingvan kapitalon, kiu havas grandan valoron por nia nuna kaj estonta mondo.

En sia ununura maniero ĉiu el ĉi tiuj grupoj de interesohavantoj povas akcepti kaj subteni multlingvecon por socia justeco, kohereco kaj parotprena civitaneco. Kune ni povas agadi por gardi la kulturan kaj scian trezorejon de multlingveco por estontaj generacioj.

* You can find references for all statistics online: education.salzburgglobal.org/statements